***Rezolucio de la***
***98-a Universala Kongreso de Esperanto***

**Ni, 1034 partoprenantoj en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 55 landoj de ĉiuj mondopartoj al la plej norda ĉefurbo, Rejkjaviko, sur la insulo Islando, diskutinte en pluraj sesioj pri la temo "Insuloj sen izoliĝo: por pli justa komunikado inter lingvokomunumoj";**
**konstatas, ke insuloj – historiaj, geografiaj kaj sociaj – estas originaj fontoj de biologia kaj kultura diverseco, kiujn indas konservi kaj protekti;**
**esprimas maltrankvilon pri la nuntempe akriĝantaj minacoj al tiu diverseco, pro pluraj homogenigaj kaj detruaj tendencoj de la regantaj ekonomiaj kaj politikaj sistemoj tutmonde;**
**samtempe bonvenigas la kreskantajn ŝancojn por translima kai transkultura interkompreniĝo, kiujn donas la disvastiĝo de komunikaj rimedoj kiel Interreto;**
**atentigas pri la graveco de lingva diverseco kaj lingva justeco en la protektado de tiu kultura bunteco, kiun heredigis al ni la insuloj de la mondo;**
**memorigas, ke ĝuste tiu protektado de diverseco estas kerna valoro de la movado por la internacia lingvo Esperanto;**
**konfirmas la volon de la Esperanto-movado kunlabori cele al mondo de "insuloj sen izoliĝo", kie ĉiuj lingvoj kaj kulturoj povas kunekzisti kaj plue disflori en reciproka respekto;**
**alvokas al mondvasta kunlaboro per lingve justaj rimedoj por kontraŭstari la minacojn de klimatŝanĝo kaj biokultura homogeniĝo;**
**asertas la urĝecon de tia agado por konservi la trezorojn de nia insuleca planedo.**



***„La ideo de daŭropoveco estas***
***nek inteklektaĵo de modernaj teknokratoj***
***nek fulmideo de ekologiemaj frenezuloj...,***
***ĝi estas nia origina monda kulturheredaĵo."***
***(Ulrich Grober)***

***Kulturoj de daŭropoveco - Agendo21 - Ĉarto de la Tero***

***Okaze de la***
***21-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kai Turismo,***
***Lloret de Mar, 2013***

# ***Esperanto 2013 - kien?***

## ***Esperanto kaj la Universala Esperanto-Asocio (UEA)***
## ***post la rezolucio de Rejkjaviko***

***Devenpunktoj*** **de la sekve prezentata sociekologia koncepto pri Esperanto estas la du universale akceptitaj faktoj:**

**1-e.** ***Nia unu komuna Planedo Tero kun sia (tut)resilienco estas limigata***
**(koncerne materialjin resursjin kji sentoksigajn povojn).**

**2-e.** ***Ni homoi estas (nur) parto (kaj partnero) en la tutrilataro de ĉio viva de ĉi planedo .***
**(Profunda kompreno pri la parenceco de ĉio viva sur nia Tero estas la origina kialo por la universala solidareco de la homoj.)**

**Ekde la jaro 1992 la tri esencaj kriteroj-konceptoj de la universala hom(ar)a menseco estas**

1-e. ***Paco***,
2-e. ***Homaj Rajtoj*** kaj
3-e. ***Daŭropoveco***.
Ili konsistigas la laborfundamenton de la UN kai ties suborganizaĵoj kaj estas amplekse traktatai en bazaj detaligaj dokumentoj (ekz. la Universala Deklaracio pri la Homai Rajtoj, la Brundtland-Raport ktp.) kaj en periode aktualigitaj-aktualigantaj raportoj.

***Daŭropoveco*** estas priskribata kiel ***"kontentigo de la bezonoi de la nuntempaj generacioj sen malhelpo-reduktigo al la venontaj generacioj kontentigi siajn bezonojn"*** (t.n. intra- kai inter-generaciaj daŭropovaj justecoj). La esenca kriterio en ekologia daŭropoveco estas "forpreni el la neviva kai viva medio ne pli multe ol povas esti regenerata kaj toksigi la biosferon ne pli multe ol povas esti sendamaĝe kompensata".
La UNESCO en sia raporto pri daŭropova evoluo (2011) diris unusignife "La vojo al daŭropveco estas lastinstance sen alternativo".
Efektive: ***Daŭropoveco ne plu estas opcio, ĝi estas neceso por ĉiui.***

La du tutmondaj krizoj de la homaro estas
1-e. ***La krizo de la justeco*** (sociala krizo) kaj
2-e. ***La krizo de la medio*** (ekologia krizo).
Ambaŭ krizoj devas esti kune kai samtempe solvataj. Ni bezonas sociale justan mondon kun ekologie sana medio.
La homaro aktuale komprenas tion kiel dilemon, el kiu (tamen) ĉi-jare rezultas plimalbonĝanta sociala kaj ekologia situacio: La breĉo inter riĉo-bonfarto kai malriĉo-mizero daŭre kreskas kai la klimatokatastrofo rapide pliakriĝas. Evidente la ĉi-epokaj ekonomio kai politiko mondvaste ne kompetentas-kapablas solvi ĉi problemaron. ***La nunaj generacioj fakte forkonsumas la futuron...***



Kulturo regulas la rilatojn inter sociaj sistemoj kaj inter tiuj kaj la medio. La krizjoj de justeco kaj ekologio estas krizoj de chi kultura regulfunkcio, do homfaritaj kaj pro tio evidente ***krizo de la homa kulturo***. La t.n. ***"kulturoj de daŭropov(ec)o"*** estas koncepto provoki-establi fortan (re)konsciiĝon de la homaj socioj (t.e. de individuoj kai kolektivoj) pri sociale justa kaj ekologie daŭropova evolu(ig)o transe de kaj kontraŭe al la detruemaj nuntempaj strukturoj,
- kunpensante ĉion vivan kai ĉion homan ĉi-cele kaj
- sukcese plenumante la postulojn de la ***Agenda 21*** de la UN (1992) kiel gvidprogramon por daŭropova evoluigo cele kion oni slogane nuntempe nomas ***"alia pli bona mondo"***,
-sin tenante je la principoj de la ***Ĉarto de la Tero***.

La kerna problemo-demando de la kulturoj de daŭropoveco estas ***la transformado den la ekonomicentrigita kulturo de tutmondigo al socialekologia kulturo de daŭropoveco***. Kiaj pens/ag/organiz/komunik-ad-formoj progresigas la ekvilibron inter kulturo kaj naturo kaj kontinue kreadas nepotaŭgan futuron?

La problemoj devas esti solvataj transe de kaj spite al la "ŝtonepoka psiko" de la nuntempa homo, t.e. de liaj egocentrismo kai praaj kutimoj, per
1-e. universala, regiona, nacia kai surloka ***re-distribuado den havaĵoj***,
2-e. ***reduktado den trokonsumemaj vivostiloj*** (rezignado) en evoluitaj-evoluantaj landoj,
3-e. ***konservado-protektado de la ekologia sistemstabileco***.
La kulturoj de daŭropoveco do implicas ankaŭ "kulturon de malplio", ne en la senco de "artefarita mizeriĝo", sed de "redukto-malplio kiel resurso" , ĉefe evitanta troigojn, disipojn kai neglektadon den la "ĝuste homa mezuro".

Efektive, nur per efika solvo-plenumo de ĉi tiuj konceptoj-postuloj ni finfine sekurigos
1-e. la biosferon ("la naturo") en sia tuto kaj
2-e. la homan ekologian niĉon ene de la medio.

Tio validas por ĉiuj politikoj, negrave iliaj nomoj kai normoj (ideologioj). Fakte temas pri

***kompleksa ekologia materialismo***, kiu kompromisige transformas kaj la primitivan praan naturideologion kai la dogmojn de la nuna merkatkapitalismo en konkrete realigeblan politikon por monda sistemo de nekolapsebla materiala interŝanĝado inter la homoj kaj la homoj kaj la medio. Ĉirilate ĉie validas la nocio de ***sufiĉeco***.

***Daŭropoveco estas demando de "libereco"*** kaj necesigas ties "konstruivan malkonstruadon" de ĉi nocio. Tio klare signifas, ke ne eviteblas certa grado de (demokratie interkonsentita) superŝtata-ŝtata-surloka regulado . Ĝis nun ne elmontriĝis vojo al iu efikadaŭropova solvo den la nun- kai post-generaciaj krizoj de justeco kai ekologio. Ambaŭsfere la nuna stato de la mondo plimalboniĝadas. Oni bone komprenu, ke la bazaj kondiĉoj por libereco estas la samaj kiel por justeco kaj fine ankaŭ por la ekologia konformeco: nutraĵoj, loĝejo, sano, sekureco, kleriĝo ktp.

La kulturoj de daŭropoveco emfazas ***trandiscipline kai transkulture*** sur metanivelo de interindividua-interkolektiva komunikado la rolojn de sociala maljusteco kaj mediodetruaj intervenoj. Ili konsciigas aparte pri la fakto, ke ĉi mondo ja detruiĝas ankaŭ per kai dum observado den la homaj rajtoj kaj den la paco, kaj ke sociala maljusteco kaj mediodifektado povas esti legitimataj per organizaj formoj kiel demokratio, teknologiaj novaĵoj aŭ amaskomunikiloj ktp. Fokusoj estas edukado, pedagogio, psikologio, la artoj kaj ties kreiva potencialo, la ĉiunivela intera komunikado (Esperanto!), la civilsocio kaj la neregistaraj organizaĵoj, partoprenigo de ĉiuj, mensa malfermiteco, toleremo kontraŭ la fremda kai (ĝis nun) nekonata ktp.

***Ni bezonas "kulturan evolucion" por fine efektivigi daŭropovan evoluigon.*** Por superi la tutgloban krizon ni konsciiĝu pri ***ne***-daŭropoveco, pri la bremsaj-malhelpaj faktoroj kiel strukturoj de sociala maljusteco, memreferencemaj kulturprocesoj-kulturagantoj (dogmoj pri ekonomia kresko kaj memreguliĝemo de la merkato, mitoj pri progreso kaj neŭtraleco, specialiĝoi, teknologioj kai teknologiaj novaĵoi, socialkontrolsistemoj, privilegioj, korupcio, burokratismo ktp.) Ankaŭ la kulturo mem kai ties tendencoj realiĝi je kosto de la medio estas afero de kritikema konsidero. Simple ja validas, ke ***kulturo ne pravigas mediodetruadon.*** 3

***Kiel enordigi Esperanton kai UEA ĉi-"sisteme"?*** Principe veras, ke ajna komunikado foruzas energion, la komunikado per interreto intertempe mondvaste tiom kiom la tuta monda aertrafiko, kun fortiĝanta tendenco. Same kiel en ĉiui aliaj kampoj de la socia (kun)vivado oni do uzu komunikadon ekologie daŭropove.

*Esperanto* kiel lingvo karakteriziĝas per tri rekoniloj:
1-e***. Integra lingveco*** (transkultureco),
2-e. ***Demokratia dulingveco*** (lingva justeco-egaleco) kaj
3-e***. Ekologia dauŭopoveco*** (biosfera konformeco).
Adekvate utiligata Esperanto kiel dua lingvo por ĉiui povas esti aplikata plenkonforme al la celoi de la kulturoj de daŭropoveco.

Se temas pri organizaĵoi, kiuj kiel UEA praktikas-disvastigas Esperanton, oni bone atentu, ke la regularo-statuto, laŭ kiu tio realiĝas, simile harmonias kun la ekologiaj preskriboj-gvidlinioj, ĉefe do ĉi-rilate kun medioekvilibriga efektiviĝo de la propraj aktivecoj. Ĉi-kuntekste validas: ***Utiligo de Esperanto en la postondoj de superrege ekonomikreske fiksita kaj biosfere detruema mondparadigmo estus groteskaĵo.*** Oni ne povas insisti pri lingvakultura diverseco kadre de la koncepto de lingva ekologio kaj samtempe agadi laŭ manieroj, kiuj aktive reduktas la biologian diversecon. Kaj, se temas pri ekolingvistiko, oni memoru, ke la ĉefa ekzemplo de ĉi scienco estas la slogano "ekonomia kresko", en kiu "kresko" per nocioj kiel "larĝa", "kreski", "alta" kaj "bona" ricevas pozitivan-simpatian aspekton, spite al la negativaj ekologiaj konsekvencoj.

Honeste tre supozeblas, ke ekz. la Universalaj Kongresoj de Esperanto, organizataj de UEA, cefe okazas laŭ samaj ***turismaj-distraj konceptoj*** kiel ĉe similaj eventoj en la ne-esperant-

ista mondo. La partoprenantoj estas homoj, kiuj jam internigis la "internan ideon" kaj ties sekvojn. Oni prezentas la organizan landon al komunikademaj bonhomoj el le cetera mondo – kiel variaĵon de internacilingva feliĉigo den la Mondo (aŭ den si mem), kiu laŭ sia naturo estas kontraŭekologia. Organizite submeti la imanentajn idealojn de komuna internacia kai transkultura lingvo por ĉiui al ideologieme merkatorientata tergloba paradigmo ne estas subtenebla. Kaj efektive: Ne estas racie-prudente solvi unu problemon kaj samtempe krei novan. Pozitivironie dirite: Estas pli bone forgesi la akuzativon ol la biosferon... La disvastigo den unu komunan lingvon por ĉiuj nur faras sencon, se ĝi okazas CO2-neŭtrale, t.e. sen pliaj ŝarĝoj den la medio. Kundetruadon den nia biosfero per komuna lingvo oni ne povas akcepti – aparte ne, se la bezono pri chi komunikilo ne estas ĝenerale sentata. La Ĉarto de la Tero jam en sia preamblo devenas , same kiel la Esperanto-Movado, de "unu homa familio" kaj ĝia ĝenerala enhavo pli multe valoras koncerne kompleksecon kaj ampleksecon de la nuntempa biologia kai kultura situacio kai sorto de ĉi Planedo. Se oni rilatus la UEA-statuton al ĉi ĉarto, la Movado tuj farus grandan salton antaŭen – ankaŭ for de la antropocentra kompreno pri lingvoj kaj direkte al sociekologie homa kulturo de unueco en diverseco. Eĉ se, kiel kelkaj kultursciencistoj kai sociologoj asertas, la "modelo de etiko estas provo internigi la naturon laŭ la valida homa valorsistemo", ĝi forme de la Ĉarto de la Tero estas la plej bona pri kiu ni ĝis nun disponas.

La ***rezolucio de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko (2013)*** adresas la signifon de" biologia kai kultura diversecoj" same kiel "la homogenigaj jkaj detruaj tendencoi de la regantaj ekonomiaj kai politikaj sistemoj" kaj "alvokas al mondvasta kunlaboro per lingve justaj rimedoj por kontraŭstari la minacoin de klimatŝanĝo kaj biokultura homogenigo". Bone. Sed (denove) mankas eĉ iomo da memkritiko koncerne la trouzadon den la medio per la propra organizaĵo UEA, kiu ne konas efektivan ***mediomanaĝosistemo***n por montri sincerecon kai honestecon rilate al biologia kai kultura diverseco***. UEA en sia aktuala formo estas parto de la trouzado-detruado den la biosfero!*** Kion signifu ***"lingve justai rimedoj"*** por kontraŭstari la minacoin de klimatoŝanjo kaj biokultura homogenigo? Ĉu la antropogene pereanta biosfero atendu ĝis kiam estos trovitaj de la (esperanto-) mondo lingve justai rimedoj por ĉesigi ĉi katastrofon? La tempo por ekagi estas nun!
La ***Ĉarto de la Tero*** (UN, 2000 - Danio kai 2002 – Johannesburg: "Edukado por Daŭropoveca Vivo kun la Ĉarto de la Tero") kiel deklaracio de bazaj etikaj principoj por universala daŭropova evoluigo prezentas ankaŭ por UEA ĉion, kio necesas ĉi-cele (ekologia justeco, ekologiaj bariloj por la libereco, ekologia daŭropoveco, antaŭzorgado).

Ni bezonas Esperanton por internacie-transkulture komuniki juste-egalece ***kai*** ekologie daŭropove en la ĉiemonde ekzistantaj ***internaciaj organizaĵoj*** (EU, UN, Ruĝa Kruco ktp.). Krom tio estas tiom multaj migrantoj nuntempe en la mondo, ke dua lingvo por ĉiui ankaŭ ĉirilate konvenas en la unuopaj nacioj sur regiona-surloka nivelo. Kaj finfine estas ja ankaŭ la interreto, per kiu oni plejmultkaze povas efike laboradi - kompensante, kompreneble!

Solidarece kaj lingve juste komunikadi: En la sfero(j) de la ***indiĝenaj popoloj*** ĉi tio aparte gravas. Sed la laboro ĉi-direkten ankaŭ signifas homogenĝon, oni ne dubu pri tio. La esenca diferenco inter indiĝenaj popoloj kaj la t.n. evoluita-evoluanta mondo estas la pli naturproksimaj praaj vivokondichoj, kiuj certe estas sub premo de nuligo, negrave ĉu per kontakto kun la Angla aŭ kun Esperanto. Oni ne subtaksu tion. Tamen: Fiksita kai honesta ekologie daŭropoveca identeco de UEA decide ŝanĝas la staton-signifon de Esperanto kompare al iu etna lingvo por ĉi tiuj popoloj, ĉar la homogeniga kai merkatodependa premo povas esti reduktita al la por la supervivado necesa kaj al la de ĉi popoloj mem libervole akceptita mezuro.

Neniu homo vivas sen medio kai minacata medio signifas minacatan liberecon, minacatan homon. ***La medio estas resurso por Esperanto, dum Esperanto ne estas resurso por la medio.*** Esperanto ankaŭ ne estas celo en si mem. Kiel pens- kai ago-koncepto demalsupra ĝi estas universala homara havaĵo, submet-ata/ita al komuna-bonfartiga uziĝo.

Forme de UEA ĝi estas alternativo kaj al privata propriet(ad)o kai al perŝtata administrado-kontrolo, do principe, aparte de siaj imanentaj sociekologiaj traitoj, ankaŭ sub ekonomia vidpunkto la plej bona. Praktiki ĝin tamen laŭ neoliberalisma-kapitalisma regularo estas kontraŭdiro en si mem. La kulturoj de daŭropoveco montras pli konvenan vojon:
Ni gesamideanoj de UEA havu la kuraĝon, surkampe de internacia-transkultura komunikado problemigi, eĉ defii la vivostilojn de la konsumsocio. Ankaŭ ni do eniĝu en la vicon de tiuj organizaĵoj, kiuj serĉas kaj trovas lokon ene de la naturaj energi- kai material-cirkuloj - kunkreante la alian pli bonan mondon laŭ la preskriboj-proponoj de la Agendo 21. Ni ĉi-koncerne devas certgrade rezigni pri t.n. privilegioj (dividataj kun la cetera mondo). Kaj ni pli bone plenumu tion ĉi sukcese antaŭ ol la nuliga evoluo de nia mondo nin devigas al tio...

***Ne estas ĝusta vivo en malĝusta.*** Ĉi frazo veras ankaŭ por UEA. Ankaŭ la lingva-kultura-komunikada agado de UEA ne permesas mediodetruadon, aparte ne, se ĉi lasta estas antaŭvidebla kai krome kvazaŭ integra parto de la propra laboro, eĉ se ne ĉiuj aktivecoj aŭtomate sekvigas ĝin. Kio validas por la individuo certe ankaŭ validas por organizaĵoj.
Ne estas alternativo al daŭropoveco kai por mensa ŝanĝiĝo ĉi-direkten. La necesa sociekologia aliiĝo de niaj viv- kai ekonomi-manieroj nur eblas, se la kulturo ilin akompanas kaj subtenas. Pro kio UEA ne estu parto de ĉi proceso?

Memoriginda, ec memorigenda, estas la ekzempliga propono de AVE el la jaro 1998, ***"Amendi la UEA-statuton per kroma punkto "A.3.d." (versio de 1980): "eduki inter siaj membroj konscion-konsciencon, ke iliaj agadoj devas akordi kun la principo de daŭropova evoluo sur nia planedo".*** Alternativo povas esti enstatutiigita eksplicita akcepto de kaj rilato al la ***Ĉarto de la Tero*** kiel gvidilo de la propra laboro.

Ĉio estus pli kongrue kai efike argumentebla favore al Esperanto kaj UEA, se ekzistus firma ekologia bazo de la lasta - pri Esperanto mem ja ne estas dubo pri ĝia imanenta daŭropov-eco.



Kompilis : Wolfgang Günther (UEA, AVE, NULA HORO)
Esperanto-Centro Harleshausen
Wilhelmshöher Weg 11, 3128 Kassel, Germanio
w.guenther.esperanto@web.de
2013.aug.05

***<u>Literaturo (elektita)</u>***

- http://de.wikipedia.org/wiki/Nachhaltigkeit
- Charta der Erde. www.earthchartainaction.org/.../fur%20Kinder%20_ Germana.pdf aŭ http://wikipedia.org/wiki/Erd-Charta
- Brocchi, D.: Die kulturelle Dimension der Nachhaltigkeit. 2008. http://www.magazin.avinus.de/2008/01/26/brocchi-kulturelle-nachha...
- www.globalisierung-infos.de
- rottensystem.blogspot.en/.../Folien_Systemische_Ursachen_der_glob...
- www.mitwelt.org/wachstum-wachstumskritik-information.html
- Sachs, W.: Ökologie - die neue Farbe der Gerechtigkeit. 2002.
- Sachs, W.: Ohne Ökologie keine transnationale Gerechtigkeit. POLIS, 1, 2004
- de.wikipedia.org/wiki/suffizienz_(ökologie)

- de.wikipedia.org/wiki/Soziale_Nachhaltigkeit
- www.globalisierungsdebatte.de/entglobalisierung.html
- Brundtland-Bericht unter www.jenseits-des-wachstums.de/index.php?id=85358&L=28id=8535
- http://de.wikipedia.org/wiki/Drei-Säulen-Modell...
- Kagan, S.: Cultures of sustainability and the aesthetics of the pattern that connects. Futures: The journal of policy, planning, and futures studies, vol. 42, n. 10, 2010
- The closing circle neu gelesen. www.umweltethik.at
- Kurt, H., Wagner, B. (Hrsg.): Kultur, Kunst, Nachhaltigkeit. Essen: Klartext Verlag, 2002.
- Krainer, L., Trattnigg, R. (Hrsg.): Kulturelle Nachhaltigkeit, oekom 2007. ISBN 978-3-86581-080-9)
- Kagan, S., Kirchberg, V. (Hrsg.): Sustainability: a new frontier for the arts and cultures, VAS, 2008. ISBN 978-3-88864-440-5
- http://www.scribd.com/doc/48978808/UNESCO-Definition-von-Kultur
- www.oeko.de/oekodoc/1318/2011-437-de.pdf
- Günther, W.: Dek aspektoj koncerne ekologian amendon de la UEA-statuto.Scienca Revuo 1/2011.
- Günther, W.: Kulturoi de dauropoveco – la ekologia dimensio de Esperanto (Cheno de argumentoi), che la kompilinto au en: Littera Scripta Manet, 2013, Akademia Libroservo, ISBN 978-80-87169-39-1
- Kirf, S.: Esperanto - ein Beitrag zur Umsetzung der Agenda 21?, 2005, diplom.kirf.de
- K. Bosselmann, Die Erd-Charta: Entwurf einer Ethik der Nachhaltigkeit, www.umweltethik.at
- J. Trittin, Ökologischer Materialismus – Wie die Natur politisch wird, http://www.campus.de/wissenschaft/politikwissenschaft/Verschiedene+... (polar 6. Ökologie und Freiheit)
- Die Schwierigkeiten mit der Nachhaltigkeit, Deutschlandfunk, http://www.dradio.de/dlf/sendungen/studiozeit-ks/1966500/